

Feliĉajna somerferiojn 2006!




Julio - 2006 - N-ro 36-a
ASTURIO

ENHAVO

- 2...Nia regiono
- 3...Plendo de la Esva
- 4...La Perfekta Paco
- 5...Mi Dezirus Vidi
- 6...Mi Ŝatas Bestojn
- 7...Mozaiko
- 8-9 Ana de Valle
- 10.Mesaĝoj
- 11.Jesuo-Infaneto
- 12.Esperanto Babilejo
- 13.Mi Demandas la Fiŝon
- 14.Newspeak
- 15.Amuzaĵoj
- 16 Pensoj 2



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



CIDRA MUZEO

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: Nicolas Muñiz

Prezidanto: Cezaro García

Sekretariino: M^a Luísa Menendez

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: Císimo Rabanedo

Kasisto: Luis González

Bibliotekistino: M^a Isabel Murillo

Gekomitatanoj:

M^a José Álvarez Faedo

Eva González

Tere Rodriguez

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILES Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depòsito legal:

Nº AS 1398 (1991)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipo

NIA REGIONO

NAVA

Ĉi tiu municipo troviĝas en la centro-orienta parto de Asturio. Ĝi havas altajn montojn kiel Peñamayor (1144 m.) kaj La Triguera (1291). Estas fama ĝia cidro-produktado (Nava havas multon da pomarboj), ĝia minerala akvo kaj la fabrikado de mebloj. Ĝi havas belajn vidindajn vilaĝojn; inter ili Carancos, La Cueva, La Cuesta, Fresnadiella, Grandiella, Sienra, Cuenya (kun la preĝejo San Andrés) kaj La Vega. Tre fama estas la Festivalo de Cidro, la duan semajnfino de julio, kun nacia turisma intereso. Aliaj festoj estas San Bartuelo, la 24n de aŭgusto, Nia Sinjorino de Fátima, dum la 16, 17, 18 de majo, kaj la "Fiesta de les Praeres", en aŭgusto.

Rekomendinda irado estas la vojo Coroña de Castru. Ĝi komenciĝas en la vilaĝo Ceceda, kie oni povas viziti la kapelon Santa Lucía, de la 17a jarcento. Je la pinto ni povas rigardi la najbarajn municipojn Cabranes kaj Piloña, kaj sciiĝi pri la kastro -antikva loĝejo- kiu tie iam estis, kaj pri la maniero vivi de la praaj asturoj. La ripozo-areo Paraes ankaŭ meritas vizitadon. En Nava naskiĝis la verkisto en astura lingvo Bruno Fernández Cepeda

La Redakcio

PLENDO DE LA ESVA

Rivero Esva, rivero Esva,
cia akvo ne estas malmulta,
sed vi preskaŭ plu ne kantas
kaj raŭkan portas la voĉon!
"Kvankam mi ne estas de malproksime
lacega kaj strebe mi venas,
ĉar dum jarcentoj mi fluas
kaj cetere tre ĉagrenas"

Al mi doloras vidi ke la landeto
iĝas kreske pli malbona
kaj de mia junultempo
eĉ ne restas la lingvaĵo
Ho, tiuj tiamaj tagoj!
Ho, la tiamaj homoj!
Lingvo de ili parolita,
tute senmanke asture

FERNÁN CORONAS (ASTURA POEZIO)

Fernán Coronas (1884-1939) estas la kromnomo de Galo Fernández (ankaŭ "Padre Galo"), verkisto en astura lingvo kiu naskiĝis en 1884 en la vilaĝo Cadavéu (Valdés, Asturio). Li estis katolika pastro, kaj vojaĝis tra kelkaj eŭropaj landoj, lernante lingvojn. En siaj poemoj li plendas pri la perdado de la asturaj lingvo kaj kulturo. Li laboris pro la lingva normaligado de la astura lingvo, kvankam plej ofte li verkis en la okcidenta dialekto de la astura. Lia verko, kiu esprimis ian senton de astura naciismo, estis centzuritaj ĝis 1984. Ŝajne li ankaŭ skribis iujn verkaĵojn ne aperintaj, kiel granda asturan vortaron kaj taglibron. La poemo kiun ni ĉi tie prezentas estas fama por la astura junularo, ĉar ĝin muzikigis en la kanzono "Rigu Esba" la grava folk-bando Llan de Cubel.

Hodiaŭ, surpasante alilandan
grundon
mi mortas pro melankolio:
kie estas miaj asturoj?
kie estas miaj Asturioj?
Mia akveto, ploranta
sen emo por kanti
iras malgaja kaj amara
kiel la koro de la maro!...

Tiel respondis la Esva
kun fonda plendo.
Kaj mi restis plorante
kaj ankoraŭ ne ploris sufiĉe!



Doktoro Atendanto

LA PERFEKTA PACO

Estis unu fojo Reĝo kiu proponis grandan premion al artisto povonta krei en tolo "La perfekta Paco".

Multe da artistoj provis ĝin kaj la reĝo observis kaj admiris ĉiun verkon. Sed nur estis du verkoj kiuj ŝajnis adekvataj al li kaj li devis elekti el la du .

La unua verko estis tre trankvila lago; ĝi estis kavazaŭ perfekta spegulo kie reflektiĝis la serenaj montoj; super ili oni trovis bluan ĉielon kun blankaj nuboj .

Ĉiuj personoj rigardantaj la pentraĵon pensis ke ĝi estis...La **perfekta Paco**".

La dua pentraĵo ankaŭ havis montojn. Ili estis krutaj kaj samtempe gravaj... Super ili oni vidis furiozan ĉielon el kiu ŝprucis impetaj fulmoj kaj tondrojn... Monto malsupre aspektis resonigi ŝaŭman torenton de akvo, kiu fine frakasiĝis en la bela lago.

Sed kiam la reĝo observis atente, li vidis malantaŭ la kaskado arbuston en fendo de la roko en kiu oni trovis nedon. Tie, ĉe la mezo el muĝi de la violeta falo de la akvo, birdo konstruis sian hejmon kaj ĝuis "La perfekta Pacon" manĝigante siajn idetojn.

La Reĝo elektis la menciitan pentraĵon kaj klarigis siajn motivojn, "Paco... ne signifas ke pro esti meze de ĉi ĉiuj aferoj ni restu trankvilaj kore".

Mi kredas ke ĉi tiu estas la vera senco de Paco.

TENERECO

Esperantigis : Ludoviko -2006

MI DEZIRUS VIDI

MIAN ANIMON

Mi dezirus vidi mian animon,
kiu, kvankam nevidebla, realas
tiun lokon kaŝanta la veron
en haveno de kvieteco kaj kalmo.


Eble ĝia soleco, malsolvebla
havas amaran nuancon de tristeco
kovrita de beleca haloo,
gaĝo de antaŭsentita eterno

Lasu al mi vidi mian tutan animon,
kie loĝas la vefto de mia esenco,
la kialo de vivad' kaj ekzistado,
por ke ĉiam ne mortu Cia prezento.

Justo Ureña

(oficiala loka kronisto de Avilés)

Esperantigis: *M^a Luisa Menéndez*
kaj *Cesáreo García*



Mi ŝatas bestojn

Tiun matenon labordevoj malebligis al mi reveni hejmen je la tempo manĝi. La horo de la manĝado alproksimiĝis kaj, post la serĉado de bona restoracio, mi decidis halti je loketo, ne tro ŝtopita de homaro, kiu ŝajnis pura kaj familia.

La mastro de la manĝejo, plumpa-korpa junulo kun elstara nazo, min akompanis al sunumita tablo dekorita de gaja florvaso. Dum mi foliumadis la manĝokarton mi notis ke la resto de la klientoj certe estis kutimaj, ĉar ili ĉiuj salutis unu la alian kiam enire kaj preskaŭ neniu povis eviti ekzameni min dum iuj minutoj (mi estis io nova en tiu escenejo).

Por la unua pledo mi decidis mikstan salaton.

—Pardonu, ĉu vi povus ĝin alporti sen tinuso?

La servanta knabo, ŝultrumante, rigardis la ĉirkaŭantaron kun dubmieno.

—Se vi permezas min sugesti la farĉitajn terpomojn...

—Dankon, mi ne manĝas viandon.

Por la dua pledo mi petis kirlitajn ĉapelfungojn.

—Pardonu, ĉu ili havas ŝinkon?

—Kompreneble, sinjoro —respondis fiera la kelnero—, tutnecese.

Mi estas vegetaranino kaj tial mi aldonis:

—Do, se vi estas tiel amabla, avertu en la kuirejo por ke oni ĝin ne enmetu...

—Ĉu eble vi preferas eglefinon? Ĝi estas tre freŝa, sinjoro.

—Mi bedaŭras, mi ne manĝas fiŝon.

—Ĉu vi estas malsana? —demandis la knabo kun tre malfermitaj okuloj, observante la reston de la klientoj, kiuj de antaŭ longe klopodis ne perdi vorton de nia konversacio.

—Ho, ne! Ne zorgu, kazas nur ke mi ne ŝatas bestojn.

Je la tablo apuda, je mia dekstro, oldulo haltis manĝi sian bistekon malfermante kvazaŭ plade siajn okulojn, kaj instinkte, li karesis la malgrandan lanhundon ripozanta je siaj piedoj. Je la centro, du virinoj de maldifinita aĝo kiuj plezure tastis bonan kunikloporcion, finigis sian taskon kun mieno de nekredemo.

—Ĉu vi ne ŝatas bestojn? —preskaŭ hurlis la damo de la centro kiu ornamis sian grandvoluman bruston per vulpo-pelta ŝalo, post gluti pecon de la tiel laŭdita eglefino—. ĴSensenta!

Face de tia sieĝo mi malevitis defendi min.

—Mi konstatas ke vi ne komprenis bone, sinjorino —mi respondis—. Ĝi estas vero, mi ne ŝatas bestojn, nome tiujn mortajn.

Post la klarigado la sento de malkomforto kiun mi perceptis kiam mi eniris en la ejon malaperis kvazaŭ magie. Mi manĝis rapide kaj mi pagis tuj. Sed certe, inter pledo kaj pledo mi konstatis, ne senplezure, kiel miaj “najbaroj” mordetis konsternitaj laktukfoliojn de la garnaĵo.

Teresa Rodriguez

MOZAIKO

LA GRANDA KUNVENO

La galaksia amaso Abelo 665, en la Granda Ursino, estas formata da pli da 3000 galaksioj.

DISRABADO MARO

Kelkaj fiŝoj-ŝipoj uzas trenado-retojn en kiuj estus loko por 12 aviadiloj Jumbo.

KINA KARANBOLO

La unua uzo donita al celuloido estis la fabrikado de pli ĉipaj bilardaj buloj.

PIONIRO DE KONDUKADO

La unua virino kiu metis sin je la stir-rado de sia veturilo estis Berta Benz, edzino de la inventisto de la unua veturilo .

NU TOLO!

La togo, vestaĵo tre estimata de la romianoj, konsistis en katuno du metroj larĝa kaj kvin aŭ ses longa.

PATRA PUNO

En la Antikva Egipto, la parenco-murditaj estis najlizitaj de kanoj, elĵetitaj al dornoj kaj bruligitaj vivantaj.

TRANĈO JE LA PIRAMID-MANIERO

La asiriaj barbiroj fariĝis famaj en la Proksima-Oriento per siaj hararanĝoj. Ili tondris hararon kun la formo de Egipto-piramido .

Daise

ANA

DE

VALLE

Ana Iglesias Arias, pli konata per sia literatura pseŭdonomo Ana de Valle, naskiĝis en Avilés la 3-an de aŭgusto de 1900.

En la verko de Constantino Suárez “Españolito” (“Hispaneto”) “Asturaj verkistoj kaj artistoj” oni legas jenon:

[Filino de malriĉaj gepatroj, ŝiaj sistemaj studadoj ne estis povinta pasi de la elementaj unugradaj instruoj, pro ĝi ŝi estis atentonta ŝian spiritajn deziregojn kun persistinta eduko pere de legadoj, al kiuj ŝi estis devota emulino ekde infaneco].

La loka ĵurnalo “La Voz de Avilés!” (“La voĉo de Avilés”) estis la unua scenejo de ŝiaj poeziaj verkoj je la jaro 1924. Ŝi daŭrigis ŝian ascendan karieron, kunlaborante en la eldonaĵoj “El progreso de Asturias” (“La Progreso de Asturio”), “El bollo” (“La Buterkuko”), “Turismo y deportes de Asturias” (“Asturaj Turismo kaj Sportoj”), “Revista de Asturias” (“Revuo de Asturio”) kaj en la festaj album-reklamoj de diversaj asturaj vilaĝoj. Ŝi disvastiĝis per siaj poezioj en la revuoj “La ilustración Iberoamericana” (“La Iberamerika Ilustrado”) kaj en “A través de esos mundos” (“Tra tiuj Mondoĵ”) de Madrido.

En 1932, ŝi malfermiĝis vojon en la eldonado, kaj tiel ekaperas “Blua Birdo”, kiu estis la unua laŭda ĉenero por ŝia poezia sentemo .

Kun motivo de ĉi tiu publikaĵo, la ĵurnalo de Ŝiŝono "Gazetaro" al ni diras :

["Ana de Valle", estas tre rimarkinda lernantino de granda poeto, ankaŭ avileŝa, Luis M. Alonso "Lumen"].

En 1939, ŝi trairis la francan landlimon kaj en la najbara nacio ŝi loĝis dum pluraj jaroj, je la fino de kiuj ŝi denove revenas al ŝia nostalgiita Avilés.

Pasinte la tempo, kiu ĉion kvietigas, ŝi eldonas, en sia dua etapo, "Novaj Tigoj" en "poezia kajeroj 2000" .

En la jaro 1974, ŝi esprimas sian tutan poezian senteman en "Pasado al la Gajeco", dediĉita al sia vilaĝo, kaj en kiu ŝi esprimas la kompletan emocion de sia anima stato.

Du jaroj poste, ŝi eldonas "Je la Ritmo de miaj Horoj", en kiu esprimas la doloron pro la neesperita perdo de sia edzo .

En 1978, kaj en la volumo titolata "Escorzos" ("Skorzoj") ŝi al ni rimarkigas sian solecon, kontraŭ kiu ŝi luktas tutpene.

Kaj je 1980, en "La otra serenidad" "La Alia Sereneco", ŝi lasas sin kondukiĝi per sia poezia vervo kaj en mallongaj poeziaĵoj ŝi al ni esprimas sian grandan fonton de poezia beleco .

Ana de Valle forpasis en Belgio, la 29-an de januaro de 1984 .

Verkis: *María Luisa Menéndez*

Esperantigis: *Celestino*

MESAĜOJ

Renoviĝo aŭ morto.-

Lastatempe ni havas internan debaton en la avilesa grupo Antaŭen pri la ebla konveno ŝanĝi la direkton de nia konstituo kaj agado. Kiel tucerte okazas al multaj, ni ne trovas en nia socio tiom da intereso pri Esperanto kiom ni ŝatus. Estas vero ke ni iam malsukcesas transigante nian mesaĝon al la ĉirkaŭantaro, sed, precipe, ni devas lukti kontraŭ ia apatio kiu kondukas la homojn nur koncerni pri siaj propraj intereso, kaj ne pri la trovo de la komuna bono. Nia ideo estas ke Antaŭen ne nur laboru por Esperanto, sed ankaŭ por lingvo kaj lingvistiko ĝenerale. Tiel ni certas ke ni povos aligi al nia grupeto homoj (especiale gejunuloj) kiuj povas nin helpi kompreni la fenomenon kaj radikon de lingvo kaj kiuj emos helpi nin diskonatigi nian laboron al diversaj branĉoj de la socio. Unu ebla kampo de aktivado estas la organizo de prelegoj temante pri fakaj aspektoj de lingvistiko, minacataj lingvoj, lingvoj de la enmigrantoj, ktp. Ni klopodus, tiusence, atingi la apogon de la Universitato de Oviedo, kiu enhavas iujn strebajn esperantistoj el sia instruistaro, la Oficejo de la Astura Lingvo kaj Kulturo de Avilés (ELliCTA; kiun la pasintan jaron direktis la prezidanto de Antaŭen) kaj aliaj porkulturaj asocioj. Ni devas pruvi ke ni, esperantistoj, ne estas strangaj klubanoj ŝlositaj en si mem kaj ke ni revas por la konstruado de pli justa kaj pli konscienca socio. Kaj, kompreneble, ĉiu tiu nova ideo ne malpermezos la disvolvigadon de Esperanto; tute ne, ĝi espereble helpos ĝin flori!

Novaj kulturaj espero por nia urbo.-

Lastatempe oni anoncis ke ĉi tie, en Avilés, la fama kaj altaaĝa arkitekto Oscar Niemeyer, kiu dezajnis la urbon Brasilia (ĉefurbo de Brazilo) estas dezajnonta –donace!– belan kaj modernan kultura centro en nia urbo, rezulte de sia dankemo pro la premio de arto kiun la Fondaĵo Princo de Asturio donis al li en 1989. La centro, kiu eble kunportos almenaŭ muzeon kaj aŭditorion, estos lokita sur bordo de la avilesa enfluejo, en zono kiu antaŭ iuj jaroj estis industria kaj nun ofertas belan videjon. Ni esperu ke iam ankaŭ la esperantistoj povos montri tie la fruktojn de sia agado!

Semajno de la kulturo kaj turismo.-

La 14-a internacia Esperanto-semajno de la kulturo kaj turismo okazos en La Pineda Platja, Vila-seca, Tarragona, Katalunio (Hispanio) de la 24 de septembro ĝis la 1 de oktobro de 2006, sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo. Por kontakti: luis-serrano@mixmail.com

Rememoru ke vi povas

kontakti nin retpoŝtante ĉi tien:

esperanto@asturies.org

INTERRETO



JESU-INFANO DE PRAGO

Preĝo de P. Cirilo de Dipatrino

Jesu-Infaneto, mi al Vi min donas, mia koro per la jena peto
sonas:

Vi min helpu en mizer' kaj en doloro.
Jen, firmege kredas mi je Vi, Sinjoro.
Ke la graco via ĉiam min
subtenos, mi dum tuta viv'
esperon tiun tenos.

Ke mi Vin ofendis, nun mi
bedaŭregas, mi el tuta mia koro
Vin amegas.

Ho Jesu-Infano, por min helpi
venu, al la persistad' en virta
viv' min benu!

Mi ja efektive volas pliboniĝi
kaj per peko plu neniam
makuliĝi.

Esti volas mi pro l' am' al Vi
ofero, mi pro l' am' al Vi
sopiras je sufero.

Amas mi nur Vin, Jesu-
Infano mia, volas mi en vivo
ĉiam estis via.

Sed pro via amo, mia Disinjoro, eĉ la aliulojn amos mia koro;
pelu for turmenton, Vin men al mi donu, submetiĝe petas mi kaj
min pardonu!

Donu, ke kun Vi, Jozef' kaj la Patrino en ĉiel' mi ĝoju post la
vivofino!

Amen. Amen. Amen.



Kunlaborantino Olga Glendovav

ESPERANTO BABILEJO

Floreto: Mi salutas ĉiun!

Tomaso: Ni salutas vin kara mia, de kie vi tajpas?

Floreto: El X lando kaj Y urbo. Mi ankoraŭ estas komencantino.

Grandulo: Tiam vi estas tute nova floreto. Ĉu?

Tomaso: Mi volonte deŝirus vin de tiu flora kampo.

Floreto: Mi ne estas deŝirebla.

Grandulo: Pardonu nin!

Floreto: Nenio okazis.

Maljuna urso: Mi estas abeleteo kaj mi flugas sur ĉiun floron.

Tomaso: Hi! Hi! Vi estas abeleteo. Mi ankoraŭ ne vidis ursoabeleton.

Maljuna urso: Tio estas la miraklo de la naturo.

Sinjinorino: Lasu Floreton! Ĉu vi ne vidas, ŝi estas ankoraŭ komencantino. Vi tute timigas ŝin. (Al Floreto)

Karulineto, ne ĉagrenu pro ili. La knaboj nur ŝercas. Ili ĉiam ŝercas. Ĝenerale tiu ĉi ejo estas bona ejo. Vizitu nin ankaŭ venontfoje.

Floreto: Mi dankas viajn kuraĝigajn vortojn. Se tie ĉi estas tiom da ŝercantoj, tiam Esperanto vivas.

Bonulo: Jes Floreto Esperanto vivas kaj vivos


L. Peter

(el la revuo Vesperto)

MI DEMANDAS LA FIŜON

Vilaĝa drinkejmastro liveris por vendado fiŝojn en sian drinkejon. La fiŝoj ne estis freŝaj, sed fiodoraj. La drinkejmastro aĉetis ilin malmultekoste kaj intencis vendi ilin multekoste al la simplaj vilaĝanoj kaj tiamaniere rapide gajni multe da mono.

Kaj vere, kiel atendis la senkonsciencia komercisto, tuj ĉirkaŭ la stablo amasiĝis ĉiuj vilaĝanoj, kiuj estis en la drinkejo; ĉiu eligis sian monujon por aĉeti de la fiŝoj. Ankaŭ Ruza Petro estis tie, sed li flaris de malproksime la fiodoron de la putrantaj fiŝoj, konjekteis pri la malhonesta konto de la profitama drinkejmastro kaj diris al si:



“Fiŝo sen akvo kaj komercisto sen trompo ne povas vivi. Sed ankaŭ kiu ŝafo iĝas – tiun la lupo formanĝas!”

Nia ruzulo stariĝis, puŝfaris al si vojon inter la vilaĝanoj, prenis unu fiŝon kaj komencis proksimigi ĝin jeŝ al sia buŝo, jen al sia orelo.

-Petro, kion vi faras? –liaj amikoj demandis lin.

-Mi demandas la fiŝon kiaj estas la novaĵoj en la maro.

-Kaj kion ĝi diras al vi? –la vilaĝanoj ridis.

-Kion? -Petro okulumis al ili -Ĝi diris al mi, ke ĝiaj novaĵoj estas tre malnovaj, ĉar antaŭ pli ol semajno ĝi eliris el la akvo!...

La vilaĝanoj komprenis la aludon, enpoŝigis siajn monujojn kaj foriris.

El la libro La Ruza Petro

NEWSPEAK

Eble vi iam (kiel mi) konfrontiĝos kun la noto, ke Esperanto iel similas al Newspeak. En sia libro "1984", George Orwell priskribas totalisman futuran ŝtaton, en kiu ankaŭ la lingvo estas kontrolata. Newspeak (novparolo) principe limigas la vortaron (tiel "penskrimoj" kontraŭ la registaro ne plu eblas) kaj iom "plireguligas" gramatikajn aferojn. Tiel ĝi similas iom al (semi)planlingvoj kiel Volapuko kaj Esperanto.

"(...) la afiksa sistemo de *Newspeak* plene koincidas kun la eltrovaĵo de Zamenhof. Kompreneble, la afiksoj venas el la angla leksiko (*un~* por *mal~*); krome, la menciita prefikso ne estas uzata, kiel ĝenerale en Esperanto, kun pozitiva vorto: *bad* (malbona) iĝis *ungood*, sed por (*mal*)*lumo* ni trovas kaj *unlight* kaj *undark*." (SILFER 1982)

La surfacaj similecoj ne estas hazardaj:

"(...) Vi scias, ke la (vera) nomo de Orwell estas Eric Blair. Li estis la nevo de Limuzin Neri, la dua edzino de Lanti. Inter la du militoj li venis loĝi ĉe Lanti, kaj ĉiam disputis kun li, ĉar Lanti principe uzis nur Esperanton en sia hejmo (Limuzin estis angla), kaj tio tre agacis Eric, kiu fine translokiĝis. Eble el tio konservis rankoron kontraŭ nia lingvo, kaj karikaturis ĝin en sia romano." (GASTON WARENGHIEN)

"Newspeak iel rilatas al Esperanto" restos en la menso de la homoj. Sed kiam iu interesato diras, ke laŭ li Esperanto iel similas al Newspeak, tiam mi rekomendas rakonti la rilaton de Blair al Lanti, emfazi ke la similecoj nur estas surfacaj.

Marcus Sikosek



Amuzajoj



சிசிமோ

Grava kor-kuracisto (tio estas, kardiologiisto) mortis, kaj liaj geamikoj kaj familianoj decidis fari grandan kaj spektaklan funeralon por li. En la preĝejo, malantaŭ la ĉerko estis grandega koro kovrita de floroj. Post la funebraj paroloj kaj la elegio, du pordetoj malfermiĝis en la ega koro, kaj la ĉerko trankvile eniris la koron per mekanika sistemo, dum aŭskultigado de bela muziko. Finfine, kiam la ĉerko estis en la korego, ĝi fermiĝis, kaj iu familiano diris, ke finfine li porĉiame tie ripozos. Tiam, unu el la amikoj de la mortinto ekridis. Ĉiuj rigardis lin, kaj li honteme diris:

- Mi tre bedaŭras pro mia ekridado... Mi ekpensis pri mia funeralo...
Mi estas ginekologiisto!

Kiu kuzo ne estas ŝatata?

La a-kuzo

Kiu ano ne estas homo?

La ban-ano

Kiu parolas ĉiujn lingvojn?

La eĥo

Kiu rano havas nur du piedojn?

La kampa-rano

La ĉielo havas ĝin, sed ne la tero.
La fraŭlino havas ĝin, sed ne la sinjorino
La diablo havas ĝin, sed ne Dio
“la litero L”

Infanoj ludas, unu el ili diras:

-Ĉu vi scias diferencon inter knabo kaj knabino?

-.....?

-knabo surportas bluajn ŝtrumpojn kaj knabino rozajn
Gisele (Francio)

Kion fari por eviti konflikton kun la bopatrino?

Ne edziĝi

PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON

C/ La Magdalena n° 26 – 1° D

PENSOJ 2

La pardono estas radio de lumo kaj varmo, sufiĉas l'inteligento en la mondo, sed mankas bonkoreco.

Mi deziris iĝi kuracisto por havi la eblecon labori sen paroli. Dum jaroj mi penegis parole... en tiu nova lobormaniero mi ne plu aperis kiel iu kiu parolas pri la religio de l'amo, sed kiu klopodas apliki ĝin.

Mi estas vivo kiu deziras vivi meze de vivoj kiuj deziras vivi. Mi, do estas devigata respekti la vivon.

Multajn el niaj kvalitoj: mildeco, humileco, mizerikordo, vereco, fideleco, rezignacio en la suferado ni ŝuldas al homoj kiuj donis al ni ekzemplon en cirkonstancoj jen gravaj, jen banalaj, kiel fajrero ilia ago resaltis en nian koron kaj ekflamigis ĝin.

Ni, ne limigu nin je laborado por la tuja aktualeco, tio taŭgas por etaj mensoj senkarakteraj kaj obsedataj de l'estanto.

Ni laboru por la vero kiu nur en la estonteco aperos brilega.

DOKTORO SCHWEITZER

Odette Scheidel (FRANCIO)